

Deklaro de Universala Esperanto-Asocio pledas por kvalita edukado en la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo



Unuiĝintaj Nacioj kaj ties membraj ŝtatoj alvokis al atingo de bonkvalita edukado por ĉiuj kiel la kvara el deksep Celoj por Daŝripova Evoluigo atingendaj ĝis la jaro 2030. Inter la antaŝvidataj rezultoj kaj la iloj por realigi tiun kvaran Celon por Daŝripova Evoluigo estas: universala elementa kaj meza edukado, universala antaŝelementa edukado, universala kapablo legi kaj skribi inter la junularo, genra egaleco, efikaj lernaj medioj kaj kvalifikitaj instruistoj.

Tiu Celo supozigas, ke, se studentoj frekventas lernejojn sub zorgo de kvalifikitaj instruistoj, ili lernos. Sed tie kuŝas silenta antaŝsupozo – nome ke la studentoj instruiĝu en lingvo kiun ili komprenas.

En multaj landoj kaj cirkonstancoj ili ne estas instruataj en la propraj lingvoj kaj oni malmulton faras por helpi ilin transiri al la lingvo de instruado. Tio ofte malavantaŝas ilin tutvive, nuligante la pozitivan de lerneja ŝeesto, de kompetenta instruado, kaj de investo en lerneja infrastrukturo. Sen instruado de lernantoj en lingvo kiun ili komprenas, ni

forŝetas monon kaj, kun ĝi, promesplenajn vivojn.

Pro tio, UNESKO proklamis la 21-an de februaro Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, festata ĉiujare. Ĝi ŝefe celas emfazi la edukajn avantaŝojn de uzado de la gepatra lingvo en lernejoj, precipe elementaj lernejoj. Infanoj lernas legi kaj skribi pli rapide en lingvo kiun ili plene scipovas – aŝ, pli precize, ili spertas malavantaŝon se ili devas komenci sian lernadon en lingvo kiun ili ne scipovas, parte aŝ komplete.

La Internacia Tago de la Gepatra Lingvo memorigas nin anka?, ke en multaj mondopartoj al tutaj lingvoj mankas oficiala statuso, oni diskriminacias kontra? iliaj parolantoj, kaj oni malatentas iliajn kulturajn valorojn.

Universala Esperanto-Asocio, kiel unu el malmultaj neregistaraj organizoj kiuj sin koncernas pri lingvaj demandoj, fote subtenas la Internacian Tagon de la Gepatra Lingvo kaj ?ia mesa?o de lingva justeco por ?iuj. Kiel diris Audrey Azoulay, ?enerala Direktoro de UNESKO, en 2018: “Nia Organiza?o dividas kun la esperantista Movado komunajn valorojn: esperon en konstruado de paca mondo, harmonian kunvivadon inter la popoloj, respekton al kultura diverseco, solidarecon trans la limoj.”

Mallonge dirite, UEA kredas je edukado por ?iuj en lingvoj kiujn ili komprenas, je lingva justeco ?iuaspekta, kaj je mondo paco per edukado kaj kompreni?o. Nia Asocio laboras por tiuj celoj en ?iu angulo de la mondo, ligita de la Internacia Lingvo Esperanto. Ni alvokas al Unui?intaj Nacioj, UNESKO, kaj ?iuj laborantoj por da?ripova mondo, ke ni kune atingu la kvaran Celon por Da?ripova Evoluigo kaj la scion, egalecon, justecon kaj perspektivon kiuj akompanus tiun atingon.

<https://www.radiohc.cu/eo/especiales/exclusivas/214879-deklaro-de-universala-esperanto-asocio-pledas-por-kvalita-edukado-en-la-internacia-tago-de-la-gepatra-lingvo>



Radio Habana Cuba